

HEROLDO

Redaktoroj: Teo Jung (1920-61), Ada Fighera Sikonska (1962-96), Perla Martinelli (1997-2000), Stano Marček - Redakcio: Heroldo de Esperanto, Stano Marček, Zvoněská 15, 036 01 Martin, Slovakio, telefaks - +421 842 422788, rete: heroldo@esperanto.sk - Kollaboras: William Auld, Zofia Banet-Fornalowa, Tano Garavaro, Leen DeJ, Perla Martinelli, Marco Picasso, Johan H. Rosbach, Giorgio Siller - Administrado: CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds - PO: 12-1114-5 S&C coop. de Literatura Foro, Svislando, rete: kce.esperanto@bluewin.ch - Posedas, eldonas, administras: Kooperativo de Literatura Foro (LF-koop) - Almenaŭ 36 numeroj jare.

DE ESPERANTO

LA INTERNACIA SENDEPENDA GAZETO DE LA ESPERANTO-MONDO

Numero 15 (1994), 76a jarkolekto

FONDITA DE TEO JUNG EN 1920

Redaktofino 20 novembro 2000

Interrete angla... Impresoj el la lando de la leviganta suno

James Murdoch, la plej juna filo de la amaskomunikila magnato Rupert Murdoch, avertis, ke la angla ne iĝos senopone la lingvo de interreto, kaj internaciaj firmaoj devas enkalkuligi alian malpliigantan gravecon.

Parolante ĉe la internacia televida festivalo en Edinburgo, Murdoch, administranta vicprezidanto de la firmao News Corp de sia patro kaj direktoro ankaŭ de la firmao Star TV, diris, ke, kvankam la angla restas slosila lingvo por interret-uzantoj, aliaj lingvoj pligravigas, kiel la ĉina, la hinda kaj la hispana.

Se komunikaj firmaoj volas konkuri en la tutmonda merkato, li diris, ili devas enfokusigi ĉiujn kvar lingvogrupojn. Ĉi tiuj kvar grupoj, ĉiuj tutmonde disvastigintaj, estas kaj plu estos plene superaj rilate la suman grandon de la merkato.

Li aludis esplorojn faritajn en Usono, kiuj antaŭvidas, ke, kvankam duono el la nuna uzantaro de interreto estas usonanoj, tiu proporcio falos al triono ĝis 2004. Li diris, ke Goldman Sachs, la investaj bankistoj, taksas, ke troviĝos 96.6 milionoj da interretuzantoj en Ĉinio ĝis 2002. Kreskado de interreto en Ĉinio superas la prognostitan kreskon je 25 %.

La ĉina, li atentigis, estas la plej parolata lingvo kun 835 milionoj da parolantoj, sekvate de la angla kun 470 milionoj, la hispana kun 330 milionoj kaj la hinda kun 300 milionoj.

En Usono kaj Britio, li diris, la koncepto pri kultura imperismo marŝas antaŭen, malatenta pri ŝvelantaj neanglingvaj merkatoj, aŭ, pli malbone, konscia pri ili, sed ankoraŭ kredanta, ke la komuna lingvo de la moderna epoko estas kaj plu estos la angla.

Estas vero, ke la angla, spite la hinda...

Nia vivo alportas al ni ĉiam novajn spertojn. Al la plej riĉaj certe apartenos nia vojaĝo al Japanio. Laŭ invito de la Loka Kongresa Komitato de la 87a Japana E-Kongreso kaj Kumamoto E-Grupo kaj dank' al sindono de du japanaj amikoj mi kaj mia edzo Jerzy havis la eblecon pasiĝi du semajnojn en mirinda Japanio.

En la tagoj 10-23 okt 2000 ni havis la eblecon kontribui al la kongreso en Kumamoto, en la aranĝoj okazintaj post ĝi, turne tra la lando, konatiĝi kun sindonaj esperantistoj kaj viziti la plej gravajn urbojn: Nara, Osaka, Kumamoto, Hiroŝimo, Kioto, Kameoka kaj Tokio. Ni konatiĝis tie kun belaj, malnovaj temploj, kasteloj, japanstilaj parkoj, ĉiam estante en amika etoso kaj ĝuante specifaĵojn de tiu bela kaj interesa lando.

Neimageble, sed kun Japanio min ligis... Lidja Zamenhof japana idealisma esperantisto, fascinita per sia personeco, decidis kolekti kaj eldoni ĉiujn ŝiajn verkojn, disajn en malfacile alireblaj E-revuoj. Li turnis sin al mi kun la peto helpi. Mi volonte akceptis la kunlaboron kaj disvolvigis amika kaj fruktodona korespondado. Dume mia amiko Masayoshi Higasida, ĉar pri li temas, konatiĝis kun ideo de Janusz Korczak, pere de la libro *Interparolo en la fruĝardeno la San de aŭ gusto*, en mia traduko. Li opiniis la libron tiel grava, ke li enkondukis ĝin kiel legajon en sia E-kurso kaj verkis pri la libro recenzon, kiu aperis en Izraela Esperantisto.

Vizito al Japanio, pri kiu mi revis. Ŝajnis ideo apenaŭ realigebla. Sed mia amiko, helpata de sia lernantino Mineko Yosikawa, la ideojn perfekte realigis. Aldone ambaŭ amikoj dum la tuta restado akompanis nin, farante ĉion eblan por nin kontentigi kaj feliĉigi.

La plej signifa parto de nia aktivado en Japanio realiĝis dum la 87a Japana Kongreso en Kumamoto.

Kelkfoje pri ĝi aliĝis 487, sed partoprenis 285 japanoj, krome gastoj el Koreio, Ĉinio, Vietnamio, Germanio, Pollando kaj Aŭstralio; de tiu lasta venis Kep Enderby, prezidanto de UEA, kun la edzino. La kongreso estis bonege organizita: la programo varia kaj la temaro riĉenhava. Krom la kutimaj kongresaj programeroj oni havis la eblecon konatiĝi kun diversgenra sceneja arto. Okazis ankaŭ interesaj ekskursoj, funkciis riĉa

libroservo kaj la Kongresa Universitato, al kiu per interesaj prelegoj kontribuis ankaŭ la gastoj. La antaŭa UEA-prezidanto Lee Chong-Young el Koreio prelegis pri *Ligo de Nacioj, Eo kaj Nitobe Inazo* kaj Daniel König el Germanio pri *Urba politiko protekti la medion*. Kelkaj prelegoj temis Azion, rilatojn de Japanio kun la najbaroj kaj pri ties E-movado.

Mi havis la eblecon kadre de la kongreso prelegi pri *La familio de Zamenhof*, koncentrigante ĉefe al la problemo, kial mi verkis ĉi-teman libron kaj kia estas entute rolo de E-familioj en la evoluo de nia

komunumo kaj ĝia identeco. La dua prelego rilatis Korczak-on; valoron de lia edukaj konceptoj por la nuntempo. Fine de tiu prelego Jerzy deklamis kortusan poemon de Jerzy Ficowski *Memoro al Janusz Korczak*, en bonega traduko de Wojciech Usakiewicz. Ambaŭ prelegoj vekis vigan intereseon, rezulte de kio tuj vendiĝis kelkdeko da libroj pri la familio de Zamenhof kaj pri Korczak. De tio oni povas konkludi, ke profunde humanismaj ideoj, kies portantoj estis Zamenhof kaj Korczak estas al japanoj tre bezonataj. (daŭrigo venontnumere) Zofia Banet Fornalowa



Renkontiĝo en Kioto: la geedzoj Forna (staranta) inter geamikoj; foto: la aŭtoro

Nia unua simfonio „La Esperanta“

En la salono Reduta de la Moravia Filharmonio en Olomouc, Ĉeĥio, okazis 6 okt 00, kunlabore kun Master Musicians Collective Boston (USA), koncerto, kiu prezentis la simfonion n-ro 1 „La Esperanta“.

La kvar movmentoj de la simfonio por mezosoprano kaj orkestro de la usona komponisto David Gaines uzas tekstojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof, Marjorie Boulton, Penka Papazova kaj David Gaines. La solistoj estis violonisto Antonin Hradil el Ĉeĥio kaj la fama usona kantistino Kimball Wheeler (mezosoprano). Estro de la orkestro estis Vit Micka.

Antaŭ la koncerto okazis surbendigo de nova kompaktdisko, kiu estos laŭ D. Gaines havebla en 2001 en ĉiuj E-butikoj kaj libroservoj.

La koncerton vizitis cento da aŭskultantoj, kiuj konstatis, ke per nia lingvo eblas esprimi ĉiujn emojn. La simfonion konsistigas motivoj el la vojaĝoj de la aŭtoro en Bulgario, Brazilo kaj Usono. La koncerto impresis moderne, la majstro verkis vere seriozan verkon, pri kiu ni povas prave fieri. Ĉe la fino la publiko plarfoje, sincere kaj varme aplaudis al la orkestro, al la solistoj, al la dirigento, sed ankaŭ al la majstro David Gaines, kiu persone ĉestis la eventon.

La majstro David Gaines, entuziasma esperantisto, estas internacie rekonata komponisto, posedanta diplomojn de la plej renomaj universitatoj. Liaj intervjuoj kaj verkoj estas aŭdeblaj en radiostacioj de Usono ĝis Brazilo kaj liaj kompo-

najojn interpretas renomaj orkestroj, ekz. Tokyo Quartet aŭ Peabody Wind Ensemble.

La kvarmovimenta kanta simfonio n-ro 1 *La Esperanta* por mezosoprano kaj orkestro estas dediĉita al la gepatroj de la aŭtoro. La unua, solena movmento proksimigas al ni la vortojn de d-ro Zamenhof, per kiuj li inaŭguris en 1910 la Universalan Kongreson en Vaŝingtono. Radias el ĝi precipe admira al la usona libereco. La dua, rapida movmento estas inspirita de poezio de la angla poetino Marjorie Boulton kaj la tria, pensiga movmento, fontas el versoj de Penka Papazova el Bulgario.

fina kvara parto, plena de alternaj humoraj scenoj, estas komponita laŭ propraj versoj de la aŭtoro. La verko estas la unua simfonio, komponita laŭ originaj Eaj tekstoj.

La solistino Kimball Wheeler komencis sian karieron per debutu kun Njujorka Filharmonio kaj kantis ekz. en la *Rosina Operejo*, en la fama

venecia teatro *La Fenice*, en Baselo, Vieno, Madrido, Zuriko, Liono kaj aliaj urboj. Nuntempe ŝi instruas en Kalifornia Instituto de Arto.

David Gaines dum la restado en Olomouc vizitis kun aŭtoro de tiu ĉi artikolo i.a. la urban parkon, kie situas E-monumento kaj la straton de L.L. Zamenhof.

L. Lani



David Gaines

Leŝneja eksperimento en Pollando